

# FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE  
77610 FONTENAY TRESIGNY  
FRANCE

# KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★  
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. CL. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS  
Sekr.: S-ro R. DESPINEY 43, quai de Champagne 94170 LE PERREUX-sur-MARNE  
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE  
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.G.P. Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 N ROUEN.

==== la n<sup>o</sup>: 3 F. Abono: 13 F. Kotizo: 2 F. Sumo: 15 F. ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent antaŭ la  
10-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

==== N<sup>o</sup> 130 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====  
\*\*\* Sankta PIO X-a, preĝu por ni. \*\*\*

===== SEPTEMBRO 1981 =====

## BILETO DE LA PREZIDANTO

"Pain partagé pour un monde nouveau". L'année 1981 a été celle du Congrès Eucharistique de Lourdes. L'invitation s'adresse à tous les chrétiens, car le partage proposé n'est pas celui d'un pain quelconque, mais celui du Christ présent dans les Espèces consacrées ainsi que dans toutes nos communautés, et offert à tous les humains, sous les formes multiples des actes d'amour et de solidarité faits par nous en Son nom.

L'état de notre monde actuel, déchiré, injuste, menaçant et menacé, est intolérable. Quelques nations s'arrogent le droit de parler haut et par là sont contraintes de manifester leurs forces respectives pour neutraliser par la crainte leurs conflits latents. Et ce sont les plus faibles qui seraient broyées les premières le jour où ces conflits exploseraient!

Cette situation dramatique, où les plus faibles, dominés par ceux qui accumulent à leur profit les fruits du progrès, sont dans l'incapacité de se soustraire à la misère et à la faim, donne-t-elle l'image du règne de Dieu dont nous demandons chaque jour la venue?

Dans un échange clair et loyal, les chrétiens venus du monde entier ont pu ouvrir leurs yeux à la nécessité de concrétiser l'idéal de justice et de fraternité par un partage réel, réciproque entre les uns et les autres: car si les uns peuvent apporter une part de richesses matérielles, techniques, intellectuelles, il a été pris conscience par les autres, les pauvres, d'un trésor spirituel enrichi par les traditions, la culture propre, une certaine de pensée, une certaine façon différente d'approcher la foi évangélique.

Mais la progression vers cette compréhension réciproque ne peut se passer d'un échange direct; ce fut l'intuition géniale de Zamenhof de créer un moyen de communication, mais aussi de promouvoir la pratique de cette communication qui a été, dès le début de ce siècle, une réussite. Et tout le mouvement espérantiste s'est développé sur le thème de la fraternité humaine, du rapprochement entre les

../...

hommes, des rapports directs entre eux de pays à pays, de peuple à peuple.

Il appartient aux chrétiens qui ont été séduits par cet esprit et qui ont acquis la pratique de la Langue Internationale d' en faire l' instrument de ce partage sur le plan de la foi et de l' amour.

Qui changera le Monde? Ceux qui seront unis dans la même volonté, opposée aux inimitiés, aux querelles, aux violences. Ils auront la force s' ils sont, s' ils se sentent ensemble, si leur spiritualité n' est pas seulement individuelle et secrète, mais si au contraire elle est partagée et éclate au point de rayonner sur les autres dans le monde entier.

Un monde nouveau? L' envoi, certes nécessaire, de vivres et de machines, les soutiens financiers plus ou moins intéressés, cela suffira-t-il pour ce renouvellement? L' objectif, c' est le Royaume de Dieu, sa nourriture, c' est la Parole. Si les chrétiens proches les uns des autres accueillent le Christ parmi eux en se réunissant, ils le font aussi, malgré la distance, en échangeant, d' une partie de la terre à l' autre, le témoignage de leur attachement à une même foi. Et, se connaissant mieux, ils seront plus forts pour lutter contre la misère, la peur, la haine.

A nous, espérantistes chrétiens, d' oeuvrer dans ce sens, afin de sentir que nous appartenons concrètement à une force qui est capable de porter l' effort universel vers le renouveau, en lui apportant le moyen privilégié de comprendre, connaître et sentir les autres: un langage commun.

C' est pourquoi, unis avec nos frères dans une même Eucharistie jusqu' aux limites du Monde, nous proposons et pratiquons cette autre forme de l' union qui est l' échange direct, le partage d' homme à homme de ses fruits spirituels, comme nous nous associons au partage du pain matériel qui est hélas! encore trop peu pratiqué au niveau des institutions: se comprendre, s' aimer, se réconforter, se soutenir dans la foi, s' aider dans les oeuvres, tel est l' enseignement des Apôtres que cette année 1981 nous a rappelé à Lourdes.

R. Cl. COLAS.

XX

NEKROLOGO: Noël BENOIT.

Em Alès (Gard), komence de 1981, foriris al la domo de l' Patro, post longa kaj kruela malsano, ĉi tiu nia frato, fidela ano de FKEA.

Em sia juneco, li aktivis ĉe la JOC (asocio de junaj katolikaj laboristoj) kaj deziris pastriĝi, sed pro lia petolemo, la superulo malkonsilis tion al li. Li edziĝis, sed vidviĝis, kiam naskiĝis lia filo. Sola li edukis ĉi tiun dum 14 jaroj. Tiam li reedziĝis kun samaĝa sinjorino al kies afableco ni ŝuldas ĉi tiun biografion. Ŝi skribas:

"Ĉe lia enterigo, kvankam ni loĝis em Alès nur de 5 jaroj 1/2, la ĉeestantaro estis tiel multnombra kiel por malnova Alès-amo, kaj multaj ploris. Em la paroĥo ĉiuj amis lin. Li estis ĉiam gaja kaj afabla al ĉiuj. Vizitanto ĉe la malsanulejoj, esperantisto, li havis noblan koron, ĝojis em sia amo al Dio kaj vidis nur la bonan flankon de ĉiu homo. Dum sia malsano, li ege suferis, sed memiam ribelis. Li nur diris: "Sinjoro, vi opinias min pli forta ol mi estas. Ĉiela Patro, vi scias, kiam Vi sendas al mi tiujn suferojn. Mi oferas ilin al Vi pere de Jesuo, Maria kaj Jozefo." Dominikano, kiu bone konis lin, skribis: "Kum infana simpleco, plena fido, li foriris kiel sanktulo; ŝajnas, ke la Sinjoro tiel iris renkonte al li, kiel li alsaltis al Lia kolo. Celebrante la diservojn, mi preĝos lin multe pli ol mi preĝos por li." Li estis mirinda servanto de Dio, kium li risradiigis al ĉiuj. Li havis nur amikojn, kredantojn aŭ ne."

Ankaŭ ni preĝos por la ripozo de lia animo, kaj certigas liajn familianojn pri nia profunda kunsento.

XX

PREĜO de Thomas Hemerten à Kempis, trad. de V.K.

Sinjoro, mi konfesas al Vi mian malvirtecon. Ofte okazas, ke homoj min malĝojigas, eĉ senkuraĝigas. Jam multfoje mi intencis agi kuraĝe kaj diaplaĉe. Sed kiam venis eĉ plej eta tento, mi estis afliktita. Tendo ankaŭ devenis de nepre bagatela afero. Em la tempo, kiam mi jam opinias, ke ĝi min ne atakas, ne unufoje mi vidis, ke min venkis eĉ malforta venteto. Tio min ofte turmentis kaj antaŭ Vi hontigis. Fare de mia peka inklino fali kaj malkuraĝe kontraŭstari al malvirtaj sopiroj mi preĝadas Dion jene: "Dio la plej forta, rigardu klopodaŭ laboron kaj dolorojn de Via mizera servanto kaj fortigu min per ĉiela kuraĝo por ke la malvirta homo ne regadu super mi."



LA ATENCO KONTRAŬ LA PAPO (teksto de Carandâma, trad. de De Salvo)

La tuta mondo restis unue senvorta kaj dubema fronte al la okazinta sakrilegio; poste manifestiĝis ektimo, kompato, maltrankvilo, solidareco. Ondo de doloro trafluis la katolikajn popolojn, antaŭ ĉio tiun polan: kvazaŭ iu profunda vundo estis donita al la koro de la homaro. Evento nekredebla aldonis plian paĝon al la homa historio, kiu havas perforton kiel ĉefmotivon. Ĉi foje, la pafocelo estis ĝuste la plej alta simbolo de neperfortemo: la apostolo de paco, la defendanto de la homaj rajtoj kaj de la homa vivo, la Papo de la enciklikoj, kiuj metas la homon je la bazo de la surtera socio, kaj ĝin prilumas per dia fajrero.

"Perforto estas mensogo - diris ĝuste Papo Wojtyla - perforto detruas tion, kion ĝi volus defendi: la dignon, la vivon, la liberon de la homoj. Perforto estas krimo kontraŭ la homaro."

La atenco kontraŭ Papo Johano Paŭlo dua akiras universalan signifon: ne tiom gravas la nacieco, la intencoj, la supozataj komplikaj helpoj aŭ la izoliteco, la plena konscio aŭ la frenezeco de la atencinto, kiom la konstato, ke en tiu freneza faro estas enfermita la disĉiriĝo de nia mondo, perturbata de la maltrankvila konscienco de kaŝaj danĝeroj, kaj trairata de kreskanta perforto, kiu minacas ĉion. Kaj kiel eviti, ke ĉi tiu perforto celu la Papon venintan el Oriento, kiu, en mallonga tempo, iĝis la apostolo de la gentoj? Li lanĉis defion de paco kaj amo, portante ĝin al ĉiuj popoloj, kvazaŭ puŝata de evangelia febro, kiu ne allasas paŭzojn. Neniu alia homo tuŝis la korojn kaj la mensojn de tiom da homoj, en ĉiuj mondpartoj, kiel Johano Paŭlo dua. Lia kredo - oni skribis - estas malnova, rigida koncerne kelkajn verojn, sed ĝi ankaŭ estas preta malfermiĝi al novaj idealoj, kun nova spirito de toleremo rilate la aliajn kredojn.

Oni ne plu povos detruiri la semon lanĉitan de Papo Wojtyla en ĉi tiuj jaroj de intensa papeco; la klopodo haltigi lian mision estas removigo de la historio mem de Kristo, kiu de jarcentoj ripetiĝas en la destino de la homoj.

HONORA KANONIKO (teksto de Manzi, trad. de De Salvo)

La socialisto François Mitterrand, elektita Prezidento de la Franca Respubliko, aŭtomate iĝis "honora kanoniko" de la Roma Katedralo (S-ta Johano ĉe Laterano). Temas pri malnova privilegio datumanta de la epoko de la franca reĝo Henriko la IV-a. Iam ĝi koncernis la francajn reĝojn; kiam Franclando iĝis Respubliko, ĝi transpasis al ĝiaj Prezidentoj. En la lastaj 20 jaroj, ĉiuj francaj Prezidentoj regule enoficiĝis, dum la unua vizito, kiam ili faris al Romo.

Mitterrand estas ankaŭ honora civitano de la itala urbo Cortona, ekde 1974, kiam la tiama urbestro, la komunisto Tito Barbini, zorgis pri ĝemeliĝo de Cortona kun la franca urbo Château-Chinon, kies urbestro estas ĝuste Mitterrand.

ESPLOROJ PRI MORTO-TUKO (teksto de Manzi, trad. de De Salvo)

Estis prezentitaj al la ĉefepiskopo de Torino, Kard. Ballestrero, la rezultoj de la studoj faritaj pri la "Sankta Morto-Tuko" de usonaj sciencistoj. La konkludoj estis: la bildo de la "Homo de la Morto-Tuko" ne estis kaŭzita de farbado, sed de kemia modifiĝo de la celulozo de la teksaĵo; la sangaj makuloj estas efektive el sango; kaj menui el la eksperimentoj faritaj por diveni la manieron laŭ kiu la bildo sur la Morto-Tuko formiĝis, donis pozitivajn rezultojn. Laŭ la tradicio, la bildo sur la Morto-Tuko de Torino estas tiu mem de Jesuo.


ANTONA JARO EN PADOVO (teksto de Artissi, trad. de De Salvo)

Solene disvolviĝas en Padovo (apud Venecio) la celebradoj de la "Antona Jaro", omaĝe al la 750-jara datreveno de la morto de S-ta Antono (la samktulo, verdire, ne estis el Padovo, sed el Lisbono en Portugalujo; sed li estas konata laŭ la urbo en kiu li plej multe agis, kaj kie li mortis).

Pluraj centmiloj da homoj, venintaj el la tuta mondo, omaĝis al la korpo de la samktulo, kiu troviĝas en urno interne de la baziliko al li dediĉita. La programo de la celebradoj antaŭvidas viziton de la Papo. La solenaj ritoj havas sian kulminon la 13-am de junio, en la festotago de la Sanktulo; en tiu okazo iris al Padovo la Patriarko de Lisbono, kiu gvidis multenombrajn grupojn da portugalaj pilgrimantoj.

\* \* \* \*

INFORMADO : Por informi la publikon pri ESPERANTO, UFE lancas novan kampanjon, kaj invitas vin partopreni per la uzo de la aldonita folio, kiun vi lasu ekz. ĉe atendejoj. . . . .



### Notre jeu de reconstruction

Coloriez chaque série géométrique d'une couleur différente. Chaque série vous dévoilera les mots à compléter d'une même phrase. Ajoutez les terminaisons nécessaires:

1. espéranto . . . . .	27
français . . . . .	28
2. espéranto . . . . .	29
français . . . . .	30
3. espéranto . . . . .	31
français . . . . .	32
4. espéranto . . . . .	33
français . . . . .	34
5. espéranto . . . . .	35
français . . . . .	36

TESTS

UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris – tél. 16.1.278.68.86 (24 h sur 24 h)

Nombre de tests réussis

Voici l'adresse de notre correspondant local:

Renvoyez-lui ce document rempli, avec 3 timbres-lettres. — Vous recevrez la correction et la fiche 2, et déciderez alors vous-même de continuer.

J'ai répondu à ces tests (cochez au choix):

- par jeu
- par curiosité
- par intérêt linguistique
- par intérêt professionnel
- par intérêt touristique
- par intérêt social, culturel
- car l'espéranto me paraît utile pour correspondre
- utile pour voyager
- utile pour échanger

Autre motif:

Notez ici votre adresse complète:

Nom et prénom

Adresse

Code postal

--	--	--	--	--

Facultatifs:

Profession

Age

• Les informations ci-dessus nous permettront, ultérieurement, si vous le désirez, de vous mettre en rapport, en France ou à l'étranger, avec des correspondants de mêmes affinités.

# LE PREMIER RENDEZ-VOUS

DE VOS DIX

## AVEC LA LANGUE INTERNATIONALE

Essayez et étonnez-vous ...

L'espéranto, c'est la plus facile des langues vivantes.

Qui l'a créée? . . . . .

TESTS

1

En quelle année? . . . . .

2

L'accent tonique, et l'orthographe: **UNE LETTRE = UN SON**

**UN SON = UNE LETTRE**

- ★ Dans la langue internationale, on ne peut faire de fautes d'orthographe.
- ★ L'accent tonique se place toujours sur l'avant-dernière syllabe.

*filo fils, domo maison, bone bien*

*alveni arriver, granda grand, afable gentiment*

Toute langue est un système de conventions ou de codes plus ou moins complexes.

- ★ Vous connaissez le code de la route où le cercle rouge montre l'interdiction, les drapeaux de couleur sur les plages, les notes de musique blanches ou noires, plus ou moins longues. — Ces conventions sont généralement adoptées, et ne souffrent pas d'exception. **IL EN EST DE MÊME POUR L'ESPÉRANTO: C'EST COMME UN SYSTÈME CODÉ, LE PLUS SIMPLE QUI EXISTE.** — La terminaison des mots indique le rôle que chacun d'eux joue dans la phrase. — Si vous voulez-bien jouer avec nous et répondre aux tests de nos dix rendez-vous, vous connaîtrez ses règles simples. — En cours de route un disque vous sera proposé qui vous résumera ce code, et vous fera entendre des voix espérantistes de différents pays.

Tous droits réservés, UFE, 1981

### FICHE INFO 1

Pourquoi LA langue internationale?

Pour éviter de donner la prédominance à une communauté linguistique sur les autres peuples ou nations, LA langue internationale se doit de n'appartenir à personne. Aucune influence économique, historique, sociale, ou religieuse ne doit se l'approprier. En effet, vouée à faciliter la communication, il faut qu'elle reste absolument libre pour devenir un lien entre toutes les communautés pour faciliter leurs échanges et leur développement.

Qu'est-ce que l'espéranto? Un docteur polonais L.L.ZAMENHOF en est l'initiateur. Sa région natale souffrait des malentendus dus aux quatre langues qui divisaient les ethnies locales.

Est-ce une nouveauté?

Depuis la tour de Babel, mille projets se sont suivis, et à ce jour, aucun n'avait franchi le cercle d'initiés. Un seul essai a maintenant la richesse de l'expérience. Les 94 ans de l'espéranto, et ses milliers d'utilisateurs par toute la terre lui ont permis de s'enrichir, de se rôder. Une immense bibliothèque d'œuvres originales, ou traduites, attestent sa maturité pour tout exprimer.

Mais l'espéranto est aussi une riche aventure humaine, un droit de l'homme!

En 1981, on peut dire vraiment que l'espéranto répond à un droit de l'homme. La Déclaration Universelle des droits de l'homme, adoptée par la plupart des nations, stipule qu'il ne doit pas être fait de barrages entre les

individus pour des raisons de langues (art. 2).

Rien également ne doit gêner la transmission des informations, et des idées à travers les frontières (art. 19). L'acquisition rapide de l'espéranto le met à la portée du plus grand nombre, de tous les milieux, de tous les niveaux de culture.

Pour une première approche, pour que vous soyez conscient de cette facilité, nous avons choisi une méthode concrète et attrayante qui passera en revue, à l'aide de tests simples, les éléments de la grammaire. Vous verrez de suite le superbe jeu de constructions que vous permet le code grammatical de la langue internationale. Après ces dix rendez-vous, sa structure n'aura plus de secret pour vous, et vous aurez envie d'aller plus loin.

## Le genre des noms

- ★ Tous les substantifs se terminent en **o**
- ★ Le sexe féminin s'indique par le suffixe **in**

patr-o père, patr-in-o mère  
fil-o fils, fil-in-o fille  
vir-o homme, vir-in-o femme

Sachant que	chat = kat-o	comment dites-vous?	chatte.....	3
	frère = frat-o		sœur.....	4
	coq = kok-o		poule.....	5
	bœuf = bov-o		vache.....	6

## Le verbe au présent

- ★ Le présent des verbes est marqué par la terminaison **as**

Sachant que	mi faras = je fais	traduire	il chante.....	7
	mi alvenas = je viens		nous dormons.....	8
	mi demandas = je demande		vous faites.....	9
	mi estas = je suis		ils sont.....	10
	mi kantas = je chante		tu apprends.....	11
	mi dormas = je dors		vous travaillez.....	12
	mi lernas = j'apprends		nous venons.....	13

## La négation

mi laboras en Parizo	mi <b>ne</b> laboras en Parizo
vi alvenas al Parizo	vi <b>ne</b> alvenas al Parizo
ni dormas en domo	ni <b>ne</b> dormas en domo

## L'article défini

- ★ Il n'y en a qu'un seul, pour traduire les articles français *le, la, les* **la**

## L'adjectif

- ★ Tous les adjectifs (au masculin comme au féminin) se terminent en **a**

la muziko estas bela  
la musique est belle  
vi estas afabla  
vous êtes aimable  
la bovino ne estas granda  
la vache n'est pas grande  
mi laboras en la bela domo  
je travaille dans la belle maison

## L'adverbe

- ★ Les adverbes se terminent en **e**

granda grand grande grandement  
afabla aimable afable gentiment  
bona bon bone bien  
rapida rapide rapide rapidement  
franca français france en français

## Rappel

- e pour l'adverbe
- a pour l'adjectif
- o pour le nom
- as pour le verbe au présent

**a**

TRADUIRE

Paris est grand	14
La mère est bonne	15
Tu es beau, je suis aimable	16

TRADUIRE

Nous apprenons bien	17
Vous venez rapidement	18
Ils demandent gentiment	19

COMPLÉTER

La frat . ne parol . . franc . .	20
Ili alven . . al Pariz . . rapid . .	21
Li kant . . bon . .	22
Mi demand . . afabl . .	23
Ni est . . en bel . . dom . .	24
La patr . labor . . en Pariz . .	25
Mi est . . bon . . frat . .	26

Dans notre feuillet n° 2 nous vous présenterons les questions, l'infinitif, le pluriel, le passé, les possessifs, les contraires et d'autres tests.

## FICHE INFO

### 1 L'espéranto est déjà un monde vivant et reconnu!

Dès 1954, la conférence générale de l'UNESCO a reconnu que les buts de l'espéranto correspondaient aux siens, et elle a admis l'association espérantiste universelle comme organisme consultatif. Cette association a des délégués officiels dans plus de 60 pays. Ceux-ci assurent dans 2200 villes du monde la liaison avec elle. — En France, plus de 150 groupes, répartis sur tout le territoire, pourvoient à l'enseignement, à l'information des gens ou des associations qui souhaitent s'ouvrir sur le monde entier.

Des échanges partout, tous les jours... Une vingtaine d'émetteurs radio officiels

(certains quotidiens comme VARSOVIE, PÉKIN...) informent régulièrement en espéranto. Il paraît des centaines de revues sur tous les sujets. Toutes les corporations, tous les groupes sociaux sont représentés (citons pour la France: les automobilistes, les aveugles, les catholiques, les cheminots, les citoyens du monde, les enseignants, les jeunes, les philatélistes, les postiers, les protestants, les rotariens, les scientifiques...).

#### Les congrès annuels

Rien qu'en Europe, il y a chaque année plus de 200 rencontres, et c'est pareil en Amérique, au Japon, en Australie... La plus importante est le congrès universel qui réunit chaque été, depuis 1905, dans un pays différent, de 2500 à 5000 participants. Il n'existe aucune société qui présente les mêmes avantages. Une grande fête,

une grande joie, une famille très diverse pouvant converser, rire, débattre sans interprètes... et sans frontières. Ces hommes, et ces femmes... et de nombreux jeunes peuvent parler de la vraie vie, celle de tous les jours dans tous leurs pays; même à l'ONU, une telle liberté d'expression n'est pas imaginable!

Ce premier rendez-vous vous incite à en savoir plus, pour vous-même, pour un ami, pour vos enfants?

Alors, n'hésitez pas à faire partie des 10 000 curieux, qui parleront peut-être l'espéranto avant leurs prochaines vacances. Remplissez le questionnaire, et envoyez-le à notre correspondant local (voir dernière page).

UFE, 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris — tél. 278 68 86

**ATTENTION!** Ce papier est du papier de récupération.

**MERCI** ... de n'emporter qu'un exemplaire

(plusieurs, si vous pensez intéresser vos amis, des enfants, des collègues)

L'UNION FRANÇAISE POUR L'ESPÉRANTO  
association sans but lucratif, régie par la loi de 1901  
participe aux campagnes contre le gaspillage du papier

- Conservez bien nos **fiches info**. Elles vous permettront de répondre à notre test général sur l'actualité de l'espéranto avec votre dernier envoi. 200 réponses, sélectionnées chaque année, se voient récompensées par un dictionnaire gratuit.

## EKUMENA KONGRESO 1981 ( KELI- IKUE )

Sur la kvieta nederlanda kamparo, apud la rava rivero Vlecht, kongresis la kristanaj esperantistoj el KELI kaj IKUE. La suno, dum la tuta semajno, brilis kaj ĝojigis la korojn de la partoprenantoj.

La etoso estis tre frata kaj afabla. La taŭga kongresejo ebligis komunan kunvivadon kaj la tagoj rapide forflugis, kun la po tri kafpaŭzoj tage, kutimaj en la tuliplando.

Tri interesaj ekskursoj kondukis al la tipa vilaĝo Vilsteren, al monto Lemelerberg, kies pinto staras je 75 m super la marnivelo, al Giethoorn, ĉarma vilaĝo kun multaj kanaloj, kiujn ni vizitis per ŝipeto. La tuttaga ekskurso kondukis al la regiono, kie oni ankoraŭ ekspluatas la torfon per modernaj maŝinoj, tre malsimilaj al la antikvaj iloj, kiujn ĉiuj vidis en la muzeo. La regiono produktas benzimoleon, kiun pumpiloj elsuĉas el la tero.

Sed la kongresanoj ankaŭ laboris dum la diskutprelegoj de Pastoro Bourdon pri Biblio kaj ekumenismo, de S-ino Koopmans pri Biblio kaj virino kaj de Pastoro Horak pri Biblio kaj paco. Post ĉiu prelego, grupetoj da KELI- kaj IKUE-anoj, frate kunigitaj, studis la temon kaj poste liveris al la tuta ĉeestantaro tion, kio montriĝis al ili plej grava. Samtempe ili petis klarigon de la preleginto pri preciza punkto.

La du ekumenaj diservoj estis altnivelaj, dank' al la kantoj majstre direktitaj de Pastoro Burkhardt. La kongresanaro unukore laŭdis Dion kaj kantis al Li sian ĝojon, eĉ se la kompleta unuiĝo de la kristanoj estas ankoraŭ malproksima. Sed la unueco estis en la koroj kaj tiu grava paŝeto al pli frata reciproka kompreniĝo certe estas bona signo por progresiga estonteco.

Albert BESSIERE.

XX

### 1981: LA INTERNACIA JARO DE HANDIKAPITOJ

Almenaŭ 500 milionoj da homoj en la mondo estas handikapitoj, sed la internacia socio nur ekkomencis atentigi la publikon pri iliaj situacio kaj malfacilaĵoj. Ĉi tiun jaron, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj nomis La Internacia Jaro de Handikapitoj kun la celo veki la mondan konscion pri tiu problemo.

Kiel difini la handikapitecon? Ĉu temas nur pri evidentaj fizikaj aŭ mensaj malhelpoj? Ĉu oni ankaŭ konsideru internajn fiziologiajn malfaciligojn? Alia demando estas la severo de la handikapo.

"Unu el la celoj", diris Ambasadoro Mansour Kikhia, Prezidanto de la Organiza Komitato de la Jaro, "estas atingi internacian interkonsenton pri kio estas handikapiteco."

Jam inter la evoluintaj kaj evoluantaj landoj komenciĝis diskutoj, kunvenoj kaj interŝanĝoj de spertoj por starigi interkulturan kaj internacian difinon surbaze de komparado de leĝoj kaj praktikoj. Kvankam ties formo estas ankoraŭ ne certa, oni povas antaŭvidi, ke formiĝos ia internacia normo pri tiu ĉi demando. "La jaro ne estas celo en si mem," diris Ambasadoro Kikhia.

Kvankam la handikapitoj frontas problemojn en ĉiu mondparto, iliaj problemoj malsamas de unu lando al alia. Unu komuna problemo estas ilia integriĝo en la socion. En la evoluintaj landoj, sociaj servoj estas multaj kaj taŭgaj, sed ofte aŭdiĝas plendoj pri la "anonima" kaj "aŭtomata" traktado. En la evoluantaj landoj, la familio estas ankoraŭ forta, sed terure mankas necesaj sociaj servoj. "La prava solvo troviĝas verŝajne en la mezo," sugestas Ambasadoro Kikhia. "Ni bezonas sociajn servojn, sed ni ankaŭ devas eduki la familion, eduki la handikapitojn mem, kaj eduki iliajn familianojn pri tio, kiel helpi ilin estiĝi efikaj anoj de la socio."

La komitato havas ankaŭ aliajn gravajn zorgojn. Ĝi okupiĝas, en kumlaboro kun la monda Organizo pri Samo, pri metodoj por redukti handikapiĝon pro malsamo, akcidentoj kaj hereditaj difektoj. Ĝi laboras por kolekti financan helpon el registaraj kaj neregistaraj fontoj. Krome ĝi faras sian eblon rekte helpi al la unuopaj registaroj kunordigi kaj evoluigi siajn servojn por handikapitoj por atingi plej efikajn kaj humanajn rezultojn.

Por pliaj informoj oni turnu sin en Esperanto al la adreso de UEA en Novjorko: Esperanto Studies Foundation, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017 USA.

RESPONDOJ AL DEMANDOJ 4 & 7 ( v. FKE n<sup>o</sup> 129 p. 2)

Mi estas abonanto de la revuo Espero Katolika kaj mi ofte laŭdas la artikolojn de D-ro Antonio De Salvo; bedaŭrinde, ke ĉe Vatikano li ne renkontas pli da komprenemo!

- 1) Vatikano ankoraŭ ne rimarkis, ke la latina ne estas plu uzebla lingvo; ĝi estas vere MORTINTA lingvo!
- 2) Multaj pastroj ankoraŭ ne komprenas la neceson dokumentiĝi kaj precipe lerni Esperanton. Tamen, la konservado de la latino en la Eklezio memorigas tiun Evangelion, en kiu Kristo ordonas ne meti la lumigilon SUB la buŝelon, sed sur alta loko, por ke ĝi lumigu ĉion.
- 3) Franca episkopo skribis al mi antaŭ kelkaj monatoj, ke kiam pluraj diverslingvaj homoj kunvenas kaj ne povas interparoli pro manko de komuna lingvo, li vidas tie pruvon pri la karito de Kristo. Vere, mi ne vidas la rilaton!
- 4) Oni relegu la rakonton pri Pentekosto: unu el la unuaj kaj frutempaj manifestacioj de l' Spirito Sankta estas doni al la Apostoloj la eblecon paroli la lingvojn de la popoloj, kiujn ili devos evangelizi. Tia estis la latino en la okcidenta mondo, sed la Eklezio devis iom post iom forlasi ĝin, kiam la naciaj lingvoj montriĝis sufiĉe firmaj kaj nuancitaj por porti la Parolon de Dio.
- 5) Johano-Paŭlo II-a diris, ke la latino devas resti la oficiala lingvo de la Eklezio, ĉar ĝi enhavas riĉaĵojn. Jes, preskaŭ ĉiuj oficialaj tekstoj postkristaj estas verkitaj latine, sed ni rimarku ankaŭ tion: ke la Koncilio Vatikano II-a forigis preskaŭ ĉiujn tiujn himnojn, kiaj "Victimae Pascali laudes, Ut queant laxis, Veni Creator, Dies irae, Libera me, Te Deum .." Do, temas pri riĉaĵoj ne plu uzataj!

6) Kion fari nun?

\*) a) rimarki, ke la pastro konsekras sian vivon al Dio kaj ne al la latino kaj ke li povas multe pli trafe uzi sian tempon portante la Parolon de Dio ol lernante tiun senutile komplikan lingvon, kiu eĉ ne povis utili dum la Koncilio.

b) kredi, ke alvenis la momento, kiam la profetaĵo de S-ta Pio X-a baldaŭ plenumiĝos: "Mi agnoskas grandam utilon al Esperanto, por unuigi la katolikojn de la tuta mondo." (Do, Lia Papa Moŝto ne vidis la kariton de Kristo en la nekomprenebleco inter homoj). Kiel mirinde belega estus pluraj centoj da milionoj da homoj kapablaj kompreni rekte unuj la aliajn se Vatikano bonvolus "konsili" al siaj pastroj kaj fideluloj lerni tiun lingvon, kiun kelkaj monatoj sufiĉas por paroli!!!

c) trovi du aŭ tri Episkopojn, kiuj sur la franca kampo, konsemtus prezidi komisionon por serioze ekzameni Esperanton kaj la eblecon enkonduki ĝin laŭgrade en la liturgion kaj en la internaciskalan administradon de la Eklezio.

Se besone, mi pretas disvolvi tiun aŭ alian punkton.

André RIBOT.

\*\*\*\*\*

SALUTON, MARIA

Maria, vin salutas ĉiuj viaj amantoj:  
La junaj kaj oldspertaj, la pastraj kaj laikaj,  
La viraj kaj ka inaj, l' silentaj kaj predikaj,  
La sanaj kaj morbemaj 'stas viaj diamantoj.

Aŭdiĝas tutatere iliaj preĝoskandoj  
Pri via graco pleno kaj viaj aŭtentikaj  
Meritoj pro la dia amo. Iliaj muzikaj  
Petoj interplektiĝas en korofidaj kantoj.

Ho sankta dipatrino, preĝu por viaj filoj,  
Kiuj al Vi alkuras per rozari-flugiloj:  
Ni larmas kun esper', kaj glorĝojas pro fidelo

Ĉiutage reĝinu en via kunularo  
Ĉiama: ni scias, ke sen ajna Amenŝparo  
Vian Kriston vi donas de nun ĝis la ĉielo.

Roger DEGRELLE

25/12/1980



KRISTANOJ EN INTERNACIAJ KONGRESOJ. La 20/21-an de junio 1981 okazis en San Sebastian (Hisp.) kunsido de eŭropaj delegitoj de la internacia kristana MIAMSI (Movado Internacia por Apostolado en Medioj Sociaj Imunaj)(1). Ĉe la internacia kongreso en oktobro 1980 en Rio de Janeiro la eŭropaj partoprenantoj konsciiĝis pri la solidareco de la kristanoj de nia kontinento: "En Eŭropo ni travivas en riĉaj landoj, ni estas riĉa medio, ni posedas kulturon, projektojn por evoluo.. ni havas subtilan povon por senfeliĝi la aliajn.. Ĉe diskutrondo en Rio, mi vidis estrojn, juristojn, kiuj - montris esceptan spiritan vastecon: konsenti pri la realeco en Latinameriko, tia kia ĝi estis montrita al ni, sen provo klarigi, kiel oni kutime faras en nia medio: "Sed ni alportas laboron! ni plialtigas la vivnivelon!".. Ni devas ree pripensi en niaj movadoj spiriton de malriĉeco... Eŭropo devas nepre konvertiĝi, ne plu antaŭenmontri sian modelon, ĉu evoluigan, ĉu alian.. Por ĉi tion ekvidi la aliaj kontinentoj helpis nin." Tiel skribas amiko de la itala movado "Kristana Renaskiĝo".

Ankaŭ sviso rimarkigas, pri la tiel nomita Tria Mondo: "Tiu demando estas rigardita je tre persona nivelo, kiun malfacile transpasas niaj medioj: oni pli ŝatas la "malgrandajn projektojn" ol la planedan planizadon. Nu, la sendependaj medioj estas ĉe la fonto de la projektoj de UN? de UNESKO.. Ili influas la mondan ekonomikon, pere de la multnaciaj firmaoj. Vizitinte UNESKO-centron Ĉimatene, mi eksciis pri la "raporto de Mac Bride" (Multaj voĉoj, unu mondo), kiu parolas pri la regado de informado, je planeda nivelo, kaj mi konstatis kiel oni malfacile pasas de la persona vidpunkto ĝis tia monda programo. Kiu eĉ ĝin konas?"

Alia sviso, pri la kongreso en Rio, skribas: "Restadi alilande estis por mi gevisoj kvazaŭ graco, kiu ebligis, ke ni komprenas la geitalojn, same kiel la aliajn eŭropajn movadojn. En Eŭropo mem, oni malfacile interkompreniĝas. Tiam travivaĵon ni spertis ĉiuj geeŭropanoj, el kiu ajn lando ni devenis."

Usonanino de AIM (Apostoloj sur la bazarplaco), kiu partoprenis la kongreson en Rio, kvankam ŝia movado ankoraŭ ne aliĝas al MIAMSI, skribis: "Ŝajnis al mi, ke mi estis preparita al la latinamerika realeco: mi estis tia nur mense. Komence ne tre plaĉis al mi la metodo, kiun uzis la Brazilanoj provante konsciiĝi nin pri tio. Du Indianoj alvenis por laŭteme paroli al ni, ankaŭ homoj, kiuj laboras en la "Favelas" (malriĉegaj kvartaloj). Mi ne konsentis (ankaŭ aliaj) min taksati kulpa, opiniante: "Ili troigas!.. Ĉu ili atendas, ke ni forlasu niajn travivaĵojn por eklabori en la "favelas"? Tamen miaj propraj reagoj maltrankviligis min; mi decidis paroli lojale kun iuj anoj de "Kristana Renoviĝo" (brazila movado). Ĉu ne estis ia espero - kristana espero - por tiuj, kiuj estas nek malriĉuloj, nek subprematoj?.. Longtempe post tiu kunsido, mi daŭre pripensis la brazilan Eklezion kaj ĝiam "preferan celelekton" al la malriĉuloj, kaj mi pridiskutadis tion kun pastroj kaj laikuloj latinamerikaj. Mi demandis min ĉu aliuloj, same kiel mi, havis tiam senton: eble tio, kio dum longaj tempoj incitadis min estis la "provoko" al ĉiu el ni montrita per tiu "celelekto". Se do ankaŭ ni decidus serioze taksati la evangelian diron pri la malriĉuloj, io grave ŝanĝus en niaj travivoj. Tio ĉi ne estis trankviliga eltrovo!.. Kio ankaŭ pri la homoj ĉirkaŭ ni?.."

La homoj, kiuj partoprenas tian movadon, konsciiĝas iom post iom, ke ili estas posedantoj de tri riĉaĵoj: Havon, Kleron, Potencan - kaj estas prirespondaj pri la dispartigo de tiuj riĉaĵoj tra la tuta mondo; kaj ilia deziro estas pri tio konsciiĝi ankaŭ la homojn de iliaj sociaj medioj. Nun estas 27 naciaj movadoj aliĝas al MIAMSI. El tiuj nacioj, 14 havas IKUE-delegitojn. En 3 aliaj estas kristanaj esperantistoj. Nur en 5 el la lastaj ne estas UEA-delegito. Laŭeble ni provu rilati kun anoj de tiu movado. Ankaŭ ili bezonas internacian lingvon.

Léon Goudé, pastro komisiita por la franca movado ACI, filio de MIAMSI.

(1) Mi iomete ŝercas, tradukante per "Imunaj" (por konservi la literon I) vorton, kiu signifas "sendependaj". En tiaj medioj oni ofte opinias, ke ne estas tiom da malfacilaĵoj por interparoli, kiam multaj homoj jam scipovas hispanan, anglan aŭ francan lingvon. Tiuflanke ankaŭ ili povas esti taksitaj "imunaj", sed kuraceblaj.

Jen la listo de la landoj aliĝantaj al MIAMSI. La signo + montras IKUE-delegiton aŭ kristanan esperantiston.

AFRIKO: Algerio, Madagaskato +, Maroko +, Maŭricio, Tunizio

AMERIKO: Argentino +, Bolivio, Brazilo +, Ĉilio, Kanado +, Kolombio +, Meksikio +, Paragvajo, Peruo, Urugvajo +

AZIO: Hindio +, Libano +, Malajzio, Singapuro

EUROPO: Belgio +, Francio +, Hispanio +, Italio +, Malto, Monako, Portugalio +, Svislando +

NASKIGDATREVENO EN ĈINUJO. Kelkaj familioj serioze observas la datojn dum aliaj ne. Por la 50-a, 60-a aŭ 70-a datreveno de la gepatroj aŭ geavoj la gefiloj aŭ genepoj observas la tagon relative serioze. Ili preparas festenon kaj invitas parencojn kaj ĉiujn proksimajn kaj malproksimajn familianojn al la solemo kaj ĉiuj donacas al la jubileanoj. Je la aliaj naskiĝtagoj, ekz. 51-a, 64-a, 65-a, aŭ 11-a, 12-a de la gefiloj, oni havas kiel la ĉefan manĝaĵon vermiĉelon, kiu simbolas longan vivon. Iuj familioj, imitante la praktikon de la okcidentuloj, preparas kukon kun tiom da kandletoj blovestingotaj de la koncernaj knaboj aŭ knabinoj, kiom ilia aĝo estas. Mia familio ne zorgas pri la naskiĝtagoj de miaj infanoj. Lastatempe, kiam mi kaj mia edzino estis 70-jaraj, miaj gefiloj aĉetis por ni po surtuto kiel naskiĝtagajn donacojn kaj kompreneble ni havis vespermanĝon kun vermiĉelo por beni nian longan vivon.

Sendis PANDISO el Shanghai (Ĉinujo)

XX

INFORMADO (R. Despiney)

Nuntempe oni ofte parolas pri la rajto al komunikado. Tiu rajto estas unu el la homaj rajtoj, kaj esperantisto normale inteligenta kaj bonkora ne povas ne aplaŭdi la klopodojn faritajn por agnoskigi tiujn rajtojn ĉefe tium pri komunikado...ne nur aplaŭdi...sed ankaŭ partopreni.

Esperanto ne estas sufiĉe konata. Estas do necese komuniki al la homoj informojn pri nia internacia lingvo. Jam UEA pere de sia pariza komisiono apud UNESKO bone laboras sur la plej alta nivelo.. tiu de granda internacia organizo. Siavice UFE havas viglan komisionon pri informado. Tiu komisiono starigis informservon apud la gazetaro. Dum la kongreso de FKEA en Grésillon ni pritraktis tiun punkton kaj rapide alvenis al la konkludo: krei specialan servon pri informado. Tiu servo ne duobligos UFE-komisionon, sed ĝin kompletigos. Ĝi pritraktos la jenan temon: "Enkonduko de Esperanto en la religiajn mediojn precipe en nian Eklezion." S-ro Bernard LEGER, membro de nia asocio, konsentis respondeci pri tiu informfako. Ĉiujn gazeteltondaĵojn pri tiu temo vi devos sendi al li, ankaŭ viajn sugestojn kaj raportojn pri viaj eventualaj klopodoj ...

Jem lia adreso: Bernard LEGER 35, rue Victor Mussault 94120 Fontenay-sous-Bois. Multaj el vi komprenu la gravecon de tiu entrepreno kaj tutkore kunlaboru kun nia amiko Bernard.

XX

DIVERSAJ INFORMOJ

1) Novjorka urbestro proklamas internacian amikecan Esperanto-semajnon: "Mi, Edward I. Koch, Urbestro de la Urbo Novjorko, per la jemo proklamas la semajnon de 12-18 julio 1981 Internacia Amikeca Esperanto-Semajno en Novjorkurbo, samtempe kun la jarkongreso de la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko en tiu ĉi urbo."

2) La doktoriga disertacio de F. Lo Jacomo "Libereco aŭ aŭtoritato en la evoluo de Esperanto" estis akceptita en Sorbonne la 29-an de junio, 1981 kun cito "Tre bone". Niajn korajn gratulojn al D-ro Lo Jacomo.

XX

NOTO DE LA KASISTINO

La kotiztabelo por 1982 aperos en la decembra numero. Se Bonvolu do iom atendi antaŭ ol pagi viajn kotizojn, ĉar certe okazos kelkaj plialtigoj de la diversaj tarifoj. Nur la dumviva kotizo restas 300 F ĝis la 31-a de decembro. Profitu la favoran prezon!!

Assoc. Cathol. Franç. pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2 324 93 N.

XX

Dépôt légal: 3ème trimestre 1981 !! Polycopié par F. M. C.  
C. P. P. n° 62 532 !! Prieuré St-Martin La Houssaye-en-Brie  
Directeur-gérant: Roger Despiney !! 77610 FONTENAY TRESIGNY FRANCE